dann für das ganze Signal. Im Gegensatz zum Quantisieren ist dieser Vorgang unter bestimmten Bedingungen vollständig, d.h. exakt, d.h. fehlerfrei rückgängig zu machen. Deshalb zeigen die Pfeile in den Bildern 1 und 2 in beide Richtungen. Diese Möglichkeit hat als erster Claude SHANNON (1916 - 2001) in seiner klassischen Arbeit [SHA] aufgezeigt und bewiesen. Ihr voraus gingen mehrere Versuche anderer Autoren, z. B. von Harry NYQUIST (1889 - 1976). Die Voraussetzung für die Rekonstruktion ist lediglich, dass das kontinuierliche Signal eine endliche Bandbreite B besitzt. Dann sind die Proben im Abstand

$$\Delta T \leq \frac{1}{2 \cdot B}$$

zu wählen. Der zugehörige Satz heißt Sampling-Theorem bzw. Probensatz. Er entspricht der experimentell bereits um 1924 von Karl KÜPFMÜLLER gefundenen Formel $\Delta t \cdot \Delta f = 1/2$ für das Einschwingverhalten von Kanälen. Es ist lediglich der Frequenzunterschied Δf durch die Bandbreite B zu ersetzen. Das Kernstück für den Shannonschen Beweis ist die Anwendung der Whittacker-Funktion, die schon beim Tonfilm und später beim Magnetband auch als Spaltfunktion bekannt war:

$$x = \frac{\sin(\alpha)}{\alpha}.$$

Darin ist α ein dimensionsfreier Wert, der vielfältige Bedeutungen annehmen kann. So kann es eine relative Zeit, Frequenz oder Spaltweite sein. Die nachrichtentechnische Grundlage ist der ideale Tiefpass. Er ist durch einen exakt rechteckig begrenzten Frequenzbereich zwischen den in **Bild 3** (Mitte oben) normierten Frequenzen $-B$ bis $+B$ (Bandbreite) gekennzeichnet. Mittel der Fourier-Transformation folgt für ihn das Zeitsignal der Whittacker-Funktion (links oben). Sie besitzt Nullstellen im Abstand $n/(2B)$ mit $n = \pm1, \pm2, \pm3$ usw. Lediglich für die relative Zeit Null existiert keine Nullstelle. Hier besitzt die Funktion ihr absolutes Maximum. Auf dieser Grundlage können nun die einzelnen Proben (Samples) als zeitgetreu verschobene Whittacker-Funktionen mit dem Maximum der Probenwerte überlagert werden (Bild 3 rechts). Als Summenwert entsteht ein kontinuierliches




Bild 3: Zum Sampling-Theorem unter Anwendung der Whittacker-Funtion

Signal, das exakt dem kontinuierlichen Original entspricht. Auf den Beweis sei hier verzichtet. Es sei lediglich noch hinzugefügt, dass ein Spektrum der Whittacker-Funktion einen rechteckigen Signalverlauf besitzt (Bild 3 unten rechts und Mitte).

Wie fundamental das Sampling-Theorem ist, lässt sich durch eine relativ einfache Umformung zeigen. In der Quantentheorie gilt die Heisenberg-Unschärfe-Relation, z. B. für die konjugierten Koordinaten der Zeitunsicherheit Δt und der Energieunbestimmtheit ΔE mit der Planck-Konstanten h gemäß

$$\Delta t \cdot \Delta E = h/2.$$

Sie gilt auch für den Spezialfall eines Photon (Lichtquant). Bei einer Frequenz ν besitzt es die Energie

$$\Delta E = h \cdot \nu.$$

Wird dies in die Heisenberg-Unschärfe-Realtion eingesetzt und die Frequenz mit dem in der Elektrotechnik üblichen Formelzeichen f beschrieben, so entsteht bereits die Gleichung des Sampling-Theorems.

Wann reichen also endlich viele Werte?

Es ist fast unglaublich, dass sich aus endlich vielen Samples der vollständige kontinuierliche Signalverlauf fehlerfrei rekonstruieren lässt. Das heißt doch, dass endlich und unendlich viele Werte gleich umfangreich sind. Doch bereits oben ist erwähnt, dass dies erst Shannon mit der Whittacker-Funktion gelang und alle vorangegangenen Versuche erfolglos waren. Also ist eine geeignete Funktion erforderlich. Erst aus dieser Sicht wird klar, dass ähnliches in vielen anderen Zusammenhängen auftritt, aber meist nicht besonders beachtet wird. Deshalb sind einige wenige Beispiele im **Bild 4** zusammengestellt.

Zum Verhältnis kontinuierlich und diskret

Beispiele	Gerade	Kreis	Signal	System
Unendlich viele Werte sind notwendig			Zeitverlauf $y = f(t)$	Frequenz- und Phasengang $f(\omega)$, $\varphi(\omega)$
Wenige Werte genügen, die aber nicht unmittelbar das Objekt bestimmen	zwei Punkte genügen	drei Punkte genügen	Bandbreite, Spektrum, Korrelation	Resonanz-, Grenzfrequenz, Güte, Stabilität
Es genügt eine minimale Anzahl vorwiegend normierter Werte zur Beschreibung	$y = m \cdot (x - x_0)$, x_0, Steigung m	r, x_0, y_0, $(x-x_0)^2+(y-y_0)^2=r^2$	$n = 2T/B$ Werte gemäß dem Sampling-theorem	Pole und Nullstellen im PN-Plan

kondiskr cdr h. völz 14.3.97

Bild 4: Beispiele dafür, dass endlich viele Werte ein Kontinuum vollständig beschreiben

Wenn ein *Vorwissen* darüber .besteht, dass die geometrische Figur eine Gerade ist, so genügen zwei Werte – z. B. zwei Punkte oder der Schnittpunkt mit der x-Achse und die Steigung – völlig zur Rekonstruktion der Geraden. Für die unendlich vielen Punkte des Kreises sind drei Punkte auf ihm oder der Mittelpunkt und der Radius erforderlich. Neben dem Sampling-Theorem ist im Bild noch der kontinuierliche Frequenz- und Phasengang eines Systems gewählt. Bei Anwendung einer Laplace-Transformation genügen hier immer endlich viele Pole und Nullstellen eines Polynoms. Verallgemeinert könnte also gelten, dass zur vollständigen Beschreibung eines Kontinuums immer dann endlich viele Werte ausreichen, wenn spezielle Eigenschaften des Objektes und eine dazu gehörende mathematische Beschreibung gegeben sind.

Die kritische Frage

Gemäß der letzten Verallgemeinerung ist es nun erstaunlich, warum nicht aus den endlich vielen gequantelten Amplitudenwerten wieder exakt die Originalfunktion gewonnen werden kann. Ist dies ein prinzipielles Problem oder kennen wir z.Z. noch nicht die entsprechenden Bedingungen. Schließlich war es ja auch vor dem Sampling-Theorem nicht der Signalverlauf theoretisch exakt zurückzugewinnen. Hierauf kann z. Z. keine endgültige Antwort gegeben werden. Es sei aber auf eine wichtige Konsequenz hingewiesen. Bei der Audio-Technik (u.a. CD) entstehen bei der Rückwandlung von digital nach Analog immer Quantisierungs-Fehler, die sich als deutliches Quantisierungs-Geräusch störend bemerkbar machen. Weil es sehr unangenehm klingt wird es vielfach durch lauteres weißes, thermisches Rauschen (das weniger unangenehm ist) verdeckt. Gelänge die fehlerfrei Rückgewinnung der Amplitude ergäben sich also völlig neue technische Möglichkeiten.

Schrifttum

[SHA] **Shannon, C. E.:** A Mathematical Theory of Communication) Bell Systems Technical Journal 27 (Juli 1948) S. 379-423 und (Oktober 1948) S.623 - 656. (eingereicht 24.3.1940). Übersetzt in: Mathematische Grundlagen der Informationstheorie. R. Oldenbourg, München - Wien, 1976

Eingegangen 2001-04-25

Anschrift des Verfassers: Prof. Dr. Horst Völz, Koppenstr. 59, D-10243 Berlin

Pri la rilato de analoga kaj cifereca (Resumo)

Hodiaŭ, almenaŭ en la tekniko, estas anloga kaj cifereca preskaŭ ĉiam uzataj kiel kontraŭaj paraj esprimoj. Tiu ĉi uzo tamen ne estas korekta, ĉu rilate al lingva origino, ĉu rilate al la vera enhava signifo. Tie ĉi oni provas klarigi la enhavojn kaj koneksojn. Tial estas kunuzataj parencaj nocioj kiel kontinua kaj diskreta. El la konsekvenca uzado de koneksoj elfluas novaj interesaj demandoj. Ties solvo povus akiri grandan praktikan signifon por estontaj teknikoj.

grkg / Humankybernetik
Band 42 · Heft 2 (2001)
Akademia Libroservo / IfK

Bazaj problemoj de ĝenerala terminologio

de Ján STOFFA (SK)

el la Konstantin-Filozofo-Universitato Nitra

1. *Enkonduko*

Unu el la bazaj homaj vivmedioj estas teknosfero, kies ĉefa parto estas tekniko (komprenata kiel aro da materiaj teknikaj objektoj). Ĝi, kiel bazo de moderna civilizo, havas retroinfluon al sia kreinto, homo. Ĝenerala teknika edukado antaŭvidas, ke homo alproprigu al si certan kvanton da ŝlosilaj teknikaj nocioj kaj pasivajn konojn de multe pli granda nombro da aliaj teknikaj nocioj. Oni nepre devas lerni ankaŭ kelkajn fakajn nomojn – teknikajn terminojn. Ĝenerala terminologio estas bezonata ne nur en unuopaj fakoj (el kiuj ĉiu havas sian propran terminaron) sed ankaŭ kiel parto de lingva kulturo. Se la lingva kulturo estas samtempe pensadkulturo, ĝi necesas ankaŭ en la teknika pensado.

2. *Terminologio kaj nomenklaturo*

La vorto *terminologio* havas duoblan signifon. La unua estas komprenata kiel mallongigita formo de ĝenerala terminologio, tio signifas *scienco pri terminoj*. La dua signifo indikas aron da terminoj de certa fako, do *terminaron*. En tiu ĉi senco havas ĉiu fako, ĉiu branĉo, ĉiu disciplino sian propran terminologion. Ankaŭ *nomenklaturo* estas terminaro, komprenata kiel kolekto da nomoj de unu speco aŭ unu vico, oni parolas pri nomenklaturo anatomia, botanika, kemia ktp.

Kvankam povas ŝajni, ke unuopaj fakoj kreas memstare kaj libermaniere siajn terminologiajn sistemojn, neniu el ili estas komplete sendependa. Plejmulto da specifaj fakoj havas sian bazon en alia, pli larĝa fako, kaj aliflanke kontaktiĝas kun fakoj parencaj. Sekve estas parto de terminoj jam antaŭe fiksita per interfakaj rilatoj. Oni ne povas imagi, ekzemple, ke ajna teknika fako ignorus ekziston de fiziko kaj ties terminojn, kreante proprajn terminojn por komunaj nocioj – tia agado certe malfaciligus komunikadon inter specialistoj el parencaj fakoj. Konsekvenco de certagrada komuneco de enhavoj en pluraj fakoj estas kvanto da komunaĵoj en iliaj terminologiaj sistemoj, unu termino do povas aparteni al pluraj fakoj (ekz. *atomo* estas faktermino fizika, kemia, materiologia k. a.)

3. *Termino*

Vortoj *termino* kaj *nomo* validas kiel sinonimoj – la nomo estas parto de ĝenerala vortprovizo, termino estas faknomo. Pli malnovaj faknomoj de unuopaj sciencaj kaj

produktaj fakoj ofte ekestis spontanee, nur parte helpe de certa sistemo, ekzemple per specialaj afiksoj. Se oni nuntempe kreas terminon, oni faru tion sisteme, eĉ tiam, se la uzata vorto jam apartenas al la ĝenerala vortprovizo de la koncerna lingvo. Konsekvence la vorto havas alian signifon ĝenerale kaj alian fake.

Krome ekzistas alia kompreno de la vorto *termino*: ĝi ne plu estas nura faknomo, sed kompleto konsistanta el nomo kaj ties difino. Tiam estas termino pli proksima al nocio, ol kiam ĝi estas komprenata nur kiel nomumo. Termino tiam esprimas ankaŭ parton de enhavo de la nocio, tiel ĝi diferenciĝas de la nomo. La difino ebligas nemiskompreneble apartigi la koncernan terminon de ajna termino en la sama sistemo. Tiam la termino ne estas plene identa kun sia nocio, por kiu povas ekzisti pluraj difinoj. Problemo estas, ke la etnaj lingvoj ne havas sufiĉe da vortoj por esprimi ĉiujn bezonatajn terminojn: ekzemple elektrotekniko havas pli ol kvar milionojn da terminoj, dum neniu lingvo posedas pli ol unu milionon da vortoj. Tiam necesas aŭ transpreni terminojn jam ekzistantajn en alia lingvo aŭ krei terminojn plurvortajn.

4. *Difino*

Difino de la termino devas esprimi la esencan parton de enhavo de la koncerna nocio, eventuale ties rilaton al aliaj terminoj de la sama sistemo. Ŝajne do unue kreiĝas termino kaj poste ĝia difino, sed la praktiko devas esti mala, ĉar la difino ebligas elekton de la plej taŭga nomumo de la fakvorto mem.

Ekzistas multaj postuloj pri la difino de termino. La unua estas *unusenceco*: ĝi malebligas al al termino kunfandiĝi kun alia termino de la sama sistemo. Sekvas *logika ĝusteco*: el formuliga vidpunkto la difino devas plenumi bazajn regulojn de la formala logiko, la difinata nocio ne rajtas esti parto de difina formulo, nocioj difinata kaj difinanta ne rajtas aparteni al diversaj kategorioj. Grava eco de la difino estas ĝia *objektiveco*: ĝi devas esprimi bazajn signojn kaj rilatojn de la nocio kaj ties termino. La difino devus enhavi nur nociojn ĝenerale konatajn kaj nociojn jam antaŭe klarigitajn per propraj difinoj. Krome, ĉiu difino respektu gramatikon de la koncerna lingvo.

5. *Nocio kaj termino*

Nocio estas centra kategorio de la teorio de ekkono. Ĝi estas abstrakta kaj respegulas nur la esencajn trajtojn de la objekto. Ĉiu scienca fako kreiĝas helpe de sistemo de la nocioj, kiuj povas, sed ne devas esti reciproke sendependaj. Enhavo de la nocio formas ĝian esencon, sed neniu difino estas kompleta ekvivalento de la nocio, esprimante nur parton de la enhavo de la nocio. Formon de nocio esprimas aro da difinoj. Same ĉiu termino havas enhavon kaj formon, sed la propra faknomo ne estas nura formo, ĉar ĝi povas esprimi jam esencan parton de la enhavo.

Rilato de nocio kaj termino kaŭzis problemojn jam en antiko. Oni opinias, ke nocio kaj termino estas en dialektika unueco, en kiu pli gravas la nocio. Ĝi havas kategoriajn ecojn de la enhavo; la termino havas kategoriajn ecojn de la formo. Unueco de nocioenhavo kaj termino-formo tamen evoluiĝas kaj ne restas senŝanĝa, tial post certa tempo povas ekesti malharmonio inter nocio kaj ĝia termino, ekz.

- termino estas indiferenta al ŝanĝoj de la enhavo: ofte estas el fremdaj lingvoj trasnprenataj teminoj signife malklaraj por hejma uzanto

- termino kontraŭas enhavon de la nocio: temas pri t. n. false motivita, perfida termino, kiu kondukas al malĝusta kompreno de la nocio, kaj kiu devus esti forigita el la terminologia sistemo. Ekzemple termino *dielektra konstanto* estis longe uzata en fiziko, kemio kaj elektroniko. Postkiam evidentiĝis, ke ne temas pri fizika konstanto, oni ekuzis terminon *permitiveco*, kiu tamen estas indiferenta.

Ĝusta termino devus harmonii kun enhavo de la nocio kaj respeguli ĝin.

6. *Ideala kaj reala termino*

Teorio de ĝenerala terminologio enhavas multajn principojn por kreado de taŭgaj terminoj, sed praktike ne eblas respekti ĉiujn principojn, ĉar ili estas parte kontraŭdiraj. Se oni, ekzemple, akceptas terminon internacie uzatan, ĝi ne povas samtempe esti klare komprenebla en ĉiuj etnolingvoj, al kies vorprovizo ĝi ne apartenas. Eĉ se necesas certa kompromiso, oni strebas optiumume uzi principojn de ĝenerala terminologio. La plej gravaj ecoj estas unusenceco, sistemeco, signifa klareco, internacieco, produkteblеco – derivebeclo, skribnormeco, precizeco, kutimeco, koncizeco, tradukebleco, vulgareco, alproprigebleco – pri ili nun sekvu kelkaj rimarkoj.

6.1 *Unusenceco*

Termino estas unusenca, se ĝi en la koncerna terminologia sistemo apartenas al ununura nocio. El konscia respektado de tiu ĉi principo rezultas, ke la unusenca termino estas por fakulo komplete komprenebla iam ajn, eĉ sen kunteksto – per tiu eco ĝi diferenciĝas de kutimaj vortoj de la koncerna lingvo, kie kunteksto ofte necesas. Ekzemple *laboro* en normala lingvouzo povas signifi „okupo“, „agado“, „profesio“ ktp., sed en fiziko temas pri precize difinita kaj mezurebla unuo.

Unu termino do ne havu plurajn signifojn ene de la sama terminologia sistemo. Bedaŭrinde, ne ĉiam tiu ĉi principo estas centprocente respektata: tiam ankaŭ la fakuloj bezonas kunteksto por senerare kompreni la terminon, ekz. por la fizikaj terminoj *konduktilo, konduktaĵo, konduktanto* ekzistas en la slovaka lingvo ununura vorto „vodič“, precize komprenebla nur en la kunteksto.

6.2 *Sistemeco*

Sistemeca estas termino, kiu estas harmonia elemento de la terminologia sistemo de la koncerna fako. Ĝia rilato al aliaj elementoj de la sama sistemo dependas de la starigita hierarkio. Lokigo de la termino ene de la sistemo postulas sukcese faritan klasigon de nocioj en la koncerna fako. Postulo de la adaptiĝo al la ekzistanta sistemo ege gravas dum kreado de novaj terminoj, ĉiu nova termino do devus plenumi la kriterion de sistemeco. Tio signifas, ke jam la vortkreaj elementoj de la termino certagrade esprimas rilatojn ene de la sistemo de la koncerna fako. Sistemecon respegulas streboj esprimi la saman lokigon per la samaj lingvaj rimedoj, aŭ: al similaj nocioj estas alproprigataj similaj terminoj.

Kiel ekzemplon de la sistemeco eblas mencii terminojn *elektrostrikcio* kaj *magnetostrikcio*. Ili indikas procezojn, kies kaŭzoj estas malsimilaj, do teorie ili povus havi malsamajn nomojn. Sed, ĉar unu el la strikcioj estis konata pli frue, la dua ricevis simi-

lan nomon kaj aldoniĝis unua parto „elektro-“ aŭ „magneto-“, kiu esprimas la kaŭzon de la procezo.

6.3 *Signifa klareco, motiviĝo*

Optimume kreita termino jam de si mem havigas al la uzanto laŭeble plej bonan informon pri la nomumita nocio. Ĝi estas signife klara en tiu senco, ke ĝi eĉ sen difino klare informas la uzanton pri sia nocio. Tiun ĉi econ kutime posedas terminoj kreitaj el konataj elementoj de la uzata etnolingvo. Sed ankaŭ multaj esprimoj internacie uzataj, precipe de latina kaj greka deveno, iĝis jam parto de etnolingvaj vortprovizoj kaj estas same signife klaraj kiel la hejmaj, ekzemple pseŭdoprefiksoj *kilo-, termo-, mikro-, elektro-,* kaj pseudosufiksoj kiel *-logio, -iko, -metrio.*

Signifan klarecon havadas la terminoj kreitaj senpere en la koncerna etnolingvo surbaze de ties lingva materialo. Sed, kiel jam dirite, etnolingvoj ne posedas sufiĉan kvanton da vortoj por indiki per ili ĉiun novan terminon. Oni povas atingi signifan klarecon ankaŭ per kunmetado de jam konataj vortoj, ekzemple *asbestocemento.* Signifa klareco de si mem ankoraŭ ne garantias, ke la termino havigas objektive plej bonan informon pri la enhavo de la koncerna nocio, kio okazas nur, se por la motiviĝo estis elektita la plej bona karakteriza trajto de la nocio.

Motiviĝo de la termino starigas ĝian informvaloron, kiu dependas de tio, kiu trajto, esprimita per la nocio, estis elektita por ties nomumo. Ĝi rilatas ankaŭ al precizeco de termino. Termino estas bone motiviĝinta, se ĝi esprimas iun el la plej karakterizaj trajtoj de sia nocio. Male, malbona motiviĝo ekestas, se por la termino estis elektita iu negrava, netipa trajto. La termino ja povas en tiu ĉi kazo plenumi sian funkcion, ĝia informvaloro tamen estas malgranda. Se oni povas elekti inter du terminoj, oni preferu tiun, kiu estas pli bone motiviĝinta. Ekzemple, por la pli bona priskribo de *izolilo* eblas uzi diverstipan motiviĝon. Ĝi povas esti pli precize karakterizata per sia formo (*telerizolilo*), per sia materialo (*porcelanizolilo*), per tensio (*alttensia izolilo*) ktp.

6.4 *Internacieco*

Tiun ĉi econ havas terminoj, kiujn oni kreis surbaze de vortoj aŭ vortradikoj, venantaj el iu internacie konata lingvo. Tio koncernas precipe terminojn latindevenajn, grekdevenajn kaj, lastatempe, anglodevenaj. Internaciiĝi povas esceptokaze ankaŭ vortoj el aliaj lingvoj: kiel tipan ekzemplon oni ofte citas la vorton *roboto*, kreitan de ĉeĥa pentristo kaj verkisto Josef Čapek (oni eĉ erare apartenigas elpenson de tiu vorto al lia pli populara frato Karel, kiu uzis ĝin en sia romano „RUR“). Surbaze de oftega transprenado de terminoj el fremdaj lingvoj, la terminologioj en etnolingvoj pli kaj pli internaciiĝas. Tio certe utilas por komunikado inter samfakuloj el diversaj lingvaj regionoj, sed aliflanke povas malfaciligi komprenon kaj ellernadon dum instruado de tiuj fakoj en unuopaj etnolingvoj.

Unu el la konsekvencoj de internaciiĝo de la terminologio estas ekzisto de terminologiaj duoblaĵoj, el kiuj kutime unu estas hejma kaj la alia internacia, simile kiel ekz. *balono-aerostato, pezo-gravito.* Duoblaĵoj kelkfoje ekzistas ankaŭ inter internaciaj terminoj mem, ekz. *kosmonaŭto-astronaŭto*, sed pli ofte ili aperas ene de etnolingva terminologio. La malplej taŭga terminologia rimedo estas transprenado de fremdlingvaj

terminoj sen pripenso de tio, ĉu ili harmonias kun la ekzistanta etnolingva terminologio aŭ ne. Komence de sia ekzisto, komputilo estis en multaj landoj nomata *computer*, eĉ se tio fremde sonis ekzemple en slavaj lingvoj. Multaj etnolingvoj nun preferas uzi laŭvortan tradukon, ekz. slovaka/ĉeĥa *počítač*, germana *Rechner.*

6.5 *Produktebleco – derivebleco*

El la ekzistanta termino oni povu produkti plej eble multajn parencajn vortojn, kutime helpe de diversaj afiksoj aŭ per kunmetado kun aliaj terminoj aŭ ties elementoj. Plej bonan produkteblecon havas unuvortaj terminoj; plej ofte okazas derivado de adjektivo de substantivo. Tial terminoj, kiuj havas pli da vortoj, inklinas al unuvortiĝo, preferata estas ekz. *kardano* al *kardana ŝafto.*

Jam dum kreado de nova termino oni devas pripensi, ke la enhavo de termino povas evoluiĝi, diferenciĝi ktp., tial indas uzi terminologian substantivon, de kiu oni poste facile derivos adjektivojn, verbojn, eventuale aliajn vortspecojn, oni do elektu terminon kapablan kombiniĝi kun terminologiaj afiksoj kaj aliaj terminoj. El terminologiaj duoblaĵoj estu preferata tiu, kiu havas pli grandan produkteblecon. En la kampo de derivado kaj terminproduktado interplektiĝas intereskampoj de unuopaj fakoj kaj de ĝenerale lingvistika vortkreado.

6.6 *Skribnormeco*

Ĝenerala termino respektas la skribnormon, se ĝi plenumas ĉiujn kriteriojn validajn por normigo de aliaj vortoj de la koncerna lingvo, estante neseparebla parto de ties vortprovizo. Se ĝi ne estas tia (ekzemple vorto slanga aŭ male profesia), ekestas malharmonio inter lernado de fako kaj lernado de gepatra lingvo. Terminoj senpripense transprenataj de fremdaj lingvoj ofte havas nekutiman formon, kiun oni perforte adaptas al la uzataj reguloj gramatikaj kaj ortografiaj, ekzemple „softo, hardo“ adaptiĝis al la slovaka lingvo kiel „softvér, hardvér“, sekve devas esti ankaŭ deklinaciataj kiel hejmaj vortoj, ekzistas eĉ derivitaj adjektivoj „softvérový, hardvérový“.

6.7 *Precizeco*

Precizeco de la termino esprimas mezuron de objektiva kongruo inter la vera enhavo de la nocio nomumita per la termino kaj inter la enhavo, kiun peras la termino mem. Ju pli multe ili kongruas, despli preciza estas la termino. Se ekzemple iuj mineraloj estas karakterizataj per terminoj *kvadrata mineralo* kaj *romba mineralo*, la terminoj ne estas tro precizaj, ĉar ne la mineraloj mem, nur la bazaj ĉeloj de iliaj kristaloj estas kvadrataj aŭ rombaj.

6.8 *Kutimeco*

Kutimeco estas natura konsekvenco de la strebo uzi terminon laŭeble plej longe sen ŝanĝoj. Ĝi esprimas la bezonon faciligi reciprokan komunikadon inter fakuloj de la sama fako kaj ankaŭ de fakoj parencaj kaj apudaj. La kutimeco estas samtempe konsekvenco de certa inerto de homaj psikaj procezoj. Unuopulo, kiu ellernas certan terminon, tendencas uzi ĝin daŭre pro kutimo, eĉ se intertempe okazis evoluoj kaj terminologiaj ŝanĝoj. Respektado de tiu ĉi eco de la termino postulas fari en terminologiaj sistemoj

nur la plej neeviteblajn ŝanĝojn. Esprimoj de kreemo de unuopaj originalemaj aŭtoroj, kiuj ne ŝatas respekti la ekzistantan terminologion de sia fako kaj preferas uzi siajn proprajn neologismojn, ne estas bonvenaj, ĉar ili malfaciligas komunikadon ene de la koncerna fako.

Sed eĉ la kutimeco estas pozitiva eco de la termino nur tiam, se la termino harmonias kun la enhavo de sia nocio. Se dum evoluo de la enhavo malboniĝas tiu ĉi harmonio, la kutimeco iĝas negativa fakto kaj ĝi malhelpas enkondukon de nova, pli taŭga termino. Estas do normale, ke dum certa tempo estas uzataj ambaŭ terminoj: la malnova – forpasanta, kaj la nova – perspektiva. Dum normigo de teknikaj terminoj oni kelkfoje respektas tiun ĉi staton kaj permesas paralelan uzadon de ambaŭ terminoj, kompreneble rekomendante la uzon de la pli nova. Kelkfoje oni en la normo mencias eĉ la malĝustan terminon kun eksplicita indiko, ke temas pri malĝusteco.

Ekzemple, por *plasto* ekzistas en la slovaka lingvo esprimo *artefarita materio*, kiu aperas en la malnovaj normoj. Ĉar „materio“ estas en fiziko kategorio de objektiva realaĵo, ampleksanta ne nur materialajn substancojn, en la jaro 1976 estis oficiale rekomendita pli preciza termino *sinteza materialo*, kiu ĝis nun estas uzata malpli ofte, precipe en ĉiutaga lingvo. Alia ekzemplo estas *krada konstanto*, kiu ĝuste estas *krada parametro*.

6.9 *Koncizeco*

Konciza termino estas laŭeble mallonga kaj superrigardebla. La postulo de koncizeco havas gravajn kialojn: se la termino de si mem ne estas konciza, oni ofte spontanee mallongigas ĝin, kelkfoje maltaŭge. Tiam la termino kutime perdas iun el siaj bazaj karakterizaĵoj, ekzemple unusencecon. Precipe plurvortajn terminojn oni ofte senigas de unu aŭ du vortoj. Ekzemple *eklektra rezistanco* estas normale mallongigata al *rezistanco*. Ĉar en fiziko ekzistas *eklektra rezistanco*, *magneta rezistanco* kaj *termorezistanco*, la mallongigo malfaciligas komprenon, pri kia rezistanco temas. Same *specifa elektra rezistanco* estas mallongigata al *specifa rezistanco*. Tian problemon eblas solvi per uzado de vortoj *rezistanco* kaj *rezistemo*, kiuj komencas esti uzataj.

Se oni preferas unuvortecon por konservi koncizecon en terminologio, rekomendata estas uzado de jam ekzistantaj kaj konataj terminologiaj mallongigoj kaj simboloj, kiuj troviĝas en terminologiaj vortaroj.

6.10 *Tradukebleco*

Tiu ĉi eco esprimas eblon de adekvata traduko de la termino en aliajn lingvojn. Ĝi ege gravas en teknika terminologio kaj precipe dum maŝina tradukado inter pluraj lingvoj. Kutime jam en oficialaj (ŝtataj) normoj en etnolingvoj estas apud hejmaj terminoj menciitaj ties ekvivalentoj en la plej uzataj fremdaj lingvoj. Nur la difino estas skribata en la hejma lingvo. Se la terminoj estas bone tradukeblaj, ne estas problemo uzi hejman terminaron kiel bazon de fakaj tradukvortaroj.

6.11 *Vulgareco*

Termino vulgara aŭ populara enhavas nurnure vortojn kaj elementojn de la koncerna etnolingvo, sekve eĉ nefakuloj povas ĝin senerare kompreni. Vulgareco rilatas al signifa

klareco de la termino en la koncerna etnolingvo. Aliflanke la vulgareco kaŭzas, ke ne estas necese krei novajn terminojn, se ili jam ekzistas en la popola lingvo. Popola lingvo, inkluzive de dialektoj, povas ankaŭ servi kiel fonto dum farado de novaj terminoj.

6.12 *Alproprigebleco*

Alproprigebleco havas grandan signifon en la lernprocezo. Oni opinias terminon bone alproprigebla, se ĝi harmonias kun la sistemo, se ĝi estas signife klara, se oni povas ĝin facile asociigi al aliaj terminoj kaj facile rememori. Plej bone alproprigeblaj kaj lerneblaj estas popolaj terminoj, kiuj estas nekutime aŭ originale motivitaj. Ankaŭ sono (prononcmaniero) de la termino povas helpi al ĝia bona alproprigo.

7. *Principoj de terminologia laboro*

Nuntempe en neniu fako faras terminologian laboron unuopulo, sed kolektivo de specialistoj en koncerna fako. Evoluigo de nova terminologia sistemo, terminologiaj normoj kaj aliaj terminologiaj dokumentoj estas kutime iniciatataj kaj kunordigataj pere de elstaraj laborejoj de la koncerna fako. Ofte eblas uzi en tiu kazo dokumentojn ellaboritajn de internaciaj institucioj, precipe en la tradiciaj fakoj. En multaj fakoj stariĝis terminologiaj komisionoj.

En la kazo de normigo de la terminologio oni starigas kunordigajn laborejojn, kiuj zorgas pri la proponoj de terminologiaj normoj. Post oficiala aprobo tiuj normoj iĝas devigaj por ĉiuj fakuloj de la koncerna kaj de aliaj fakoj. Kelkaj ŝtataj normoj povas esti rekomendaj, do ne devigaj, sed ankaŭ en tiu kazo estas konsilinde respekti ilin, tio estas ĉiam pli taŭga ol senpripensa kaj spontanea uzado de ajnaj terminoj. Krome, normoj kutime respektas enradikiĝintan uzadon de siaj fakterminoj.

Ĉar terminoj havas ankaŭ sian lingvistikan flankon, pri kiu specialistoj pri unuopaj fakoj ne ĉiam kompetentas, en terminologiaj komisionoj laboras ankaŭ lingvistoj, kiuj prijuĝas lingvan taŭgecon de la terminologiaj normoj ankoraŭ antaŭ ties aprobo. Se la normoj enhavas fremdlingvajn ekvivalentojn de la terminoj, estas organizenda ankaŭ kunlaboro de eksterlandaj lingvistoj.

8. *Kreado de novaj terminoj*

Novan terminon oni povas krei diversmaniere. La plej ofta vojo, precipe se temas pri tute novaj inventaĵoj, estas transpreno de la fremdlingva faknomo sen ajna ŝanĝo. Nur hazarde povas tiaspeca termino plenumi ĉiujn necesajn kriteriojn. Tial multaj tiaj terminoj estas uzataj nur portempe, dum kreiĝas taŭga hejma termino. Tiel en multaj etnolingvaj terminologioj estis uzata la rusa vorto *sputnik*, kiun oni pli poste anstataŭigis per *satelito* aŭ *artsatelito*. Multaj fremdlingvaj terminoj tamen hejmiĝis kaj estas uzataj ankaŭ en etnolingvoj, ne ekzistas ekzemple slovaka varianto de la vortoj *filtro*, *pigmento*, *termostato*, *ventilo* (filter, pigment, termostat, ventil) k. a.

Alia maniero estas transpreno de fremdlingva termino kaj ĝia adapto al la lingvonormoj tiel, ke ĝi povas eniri en la ekzistantan terminologian sistemon de la koncerna etnolingvo. Tiu ĉi maniero estas ofta kaj taŭgas, se same jam kreiĝis aliaj terminoj en la

sama sistemo. Kiel ekzemploj servu *ĉipo, sendviĉo, kontenero, kapacito* (čip, sendvič, kontejner, kapacita) uzataj en la slovaka lingvo.

Tria eblo estas laŭvorta traduko el fremda lingvo – jam menciiĝis ĉi tie slovaka traduko de la angla *computer* (počítač).

Optimuma kaj plej ofte uzata estas kreado de nova termino el etnolingva materialo tiel, ke ĝi plenumu laŭeble plej multajn konstrukriteriojn. Tiam la termino havas jenajn eblojn: ĝi

- estas tute nova vorto en la koncerna lingvo
- uzas en nova senco vorton jam antaŭe konatan
- kombiniĝas el du aŭ pluraj konataj vortoj
- kreiĝas kiel kunmetita vorto el konataj elementoj, ekz. *elektrotekniko*
- deriviĝas pere de terminologia faka afikso aŭ pseŭdoafikso
- estas akronimo el longa plurvorta termino
- estas mallongigo (plej ofte unuvortigo) de du- aŭ plurvorta termino

Ebloj de kreado de novaj terminjo estas nelIĉerpigeblaj kaj plurfoje ekzistas por la sama terminologia problemo pluraj solvoj, el kiuj oni povas elekti la optimuman.

9. *Normigo en terminologio*

Normigo gravas en moderna scienco kaj tekniko ne nur dum fabrikado de bonkvalitaj produktoj, sed ankaŭ en la komunikado. En la kampo de terminologio ĝi konsistas el ellaborado kaj novenkondukado de (ŝtataj) terminologiaj normoj, kaj el klara determino de unuopaj nocioj en oficialaj normoj, kutime en la enkonduka ĉapitro aŭ en speciala terminologia aldonaĵo. Normigo koncernas antaŭ ĉio teknikajn fakojn.

Nur parte estas normigataj natursciencaj fakoj, ege malmulte humanistikaj fakoj, sed produktadon kaj teknikon oni apenaŭ povas imagi sen normigo. Ekzistas multaj oficialaj normoj, kiuj havas formon de ĝenerale devigaj juraj dokumentoj. Kelkaj estas devigaj nur por unuopaj fakoj, kelkaj egalas al leĝoj. Avantaĝo de normigo estas, ke ĝi kutime okazas en internacia skalo: tio garantias ne nur unuecan kompreneblon de unuopaj nocioj, sed ankaŭ ebligas internacian fakan komunikadon, ĉar terminologiaj normoj jam ofte enhavas terminologiajn tradukvortarojn.

10. *Fontoj de terminologiaj informoj*

10.1 *Monografioj*

Bazaj terminologiaj verkoj estas monografioj pri ĝenerala terminologio. Ili estas unuagrada fonto de terminologiaj informoj en teoria kaj metodologia kampoj. Ili ankaŭ enhavas multajn solvojn de terminologiaj problemoj, kiujn starigis praktika uzado. Dua fonto estas monografioj specialiĝintaj pri unuopaj teknikaj fakoj. Tiaj monografioj ne estas oftaj.

10.2 *Terminologiaj normoj*

Terminologiaj ŝtataj normoj estas la plej aŭtoritata fonto de la terminologiaj informoj, se temas pri la vortigo de unuopaj terminoj. Ekzistas ankaŭ pli kaj pli da internaciaj normoj ŝtate respektataj. La malvantaĝo de normoj estas, ke la difinoj, kiuj tie troviĝas, ne ĉiam plenumas bazajn postulojn pri racieco kaj logikeco, tial oni opiniu ilin nur orientigaj, plej bone kiel unuan krudan informon, kiun necesas kompletigi el pli fidindaj fontoj.

10.3 *Terminologiaj vortaroj*

Terminologiaj (nomenklaturaj) vortaroj estas la ĉefa fonto de terminologia informo, precipe en la fakoj, kie la terminologio ankoraŭ ne estas normigita. Tiaj vortaroj kutime enhavas kaj terminojn, kaj ties difinojn. Ili povas esti ordigitaj laŭalfabete, tiam ili estas pli avantaĝaj dum rapida serĉado de informoj. Aliflanke ili povas esti ordigitaj laŭsisteme, tiam ili ofertas pli bonan superrigardon kaj alproprigeblon de la koncerna sistemo kaj de la hierarkiaj rilatoj de unuopaj nocioj ene de la sistemo. Ideala kompromiso estas laŭsistema ordigo kompletigita per alfabeta registro.

10.4 *Fakaj klerigvortaroj, leksikonoj kaj enciklopedioj*

Fakaj klerigvortaroj estas skribitaj antaŭ ĉio por la fakuloj de la unuopaj fakoj kaj ne por granda kvanto da nefakuloj. Ankaŭ ili estas valoraj informfontoj. Ili estas plej ofte laŭalfabete ordigitaj. Se ili ankaŭ havas referencan aparaton, ili ebligas superrigardon de la hierarkia starigo de la sistemo. Tekstoj pri unuopaj kapvortoj enhavas difinojn. Tiaj verkoj ekzistas en multaj fakoj kaj estas avantaĝaj por siaj uzantoj per tio, ke ili respegulas la staton de terminologio en certa tempo.

Fakaj leksikonoj principe ne diferenciĝas de fakaj klerigvortaroj, ili povas esti iom pli larĝe konceptitaj. Fakaj enciklopedioj kutimas doni pli da detalaj kaj elĉerpigaj informoj pri enhavoj de unuopaj nocioj.

10.5 *Ĝeneralaj klerigvortaroj, leksikonoj kaj enciklopedioj*

Tiuj ĉi verkoj diferenciĝas de la antaŭe pritraktitaj precipe en du aspektoj. Unue, ili volas servi al nefakuloj. Tial ili estas pli valora fonto da informo nur kaze de nomumo de la nocioj. La difinoj, kiujn ili enhavas, devas esti laŭeble plej kompreneblaj por nekompetentuloj, tial la terminoj estas ofte anstataŭigataj per ĝenerale uzataj vortoj aŭ priskriboj.

La alia aspekto estas, ke plej ofte temas pri multfakaj terminaroj. La aŭtoroj de tiaj verkoj ne povas, samkiel iliaj fakaj kolegoj, pritrakti la kompletan problemaron sur profesia faknivelo. Tial ili devas inviti kunlabori fakulojn kiel kunaŭtoroj kaj recenzantoj. Kunordigo de kunlaboro de tiaj teamoj estas pretendema afero, kiu ne ĉiam glate funkcias. Nur malofte aperadas por nefakuloj unufakaj klerigaj verkoj. Tiuj estas iom pli valoraj kiel informfontoj, ĉar ili enhavas konsiderindan kvanton da terminoj, bedaŭrinde ne ĉiam sufiĉe kompreneble klarigitaj. Ankaŭ en tiaj verkoj estas avantaĝe, se ili enhavas referencan aparaton.

Celon de ĝeneralaj klerigvortaroj plenumas ankaŭ bazaj lingvaj vortaroj tiam, kiam la terminoj estas konsiderataj parto de la ĝenerala vortprovizo de la koncerna lingvo. Ili enhavas preskaŭ nur la plej konatajn kaj kutimajn terminojn unuvortajn. La difina parto estas tre konciza. Aparta avantaĝo de tiaj vortaroj estas aldonaj informoj lingvistikaj, kiel ĝusta ortografio, fleksio kaj prononco. Krome estas ĉe unuopaj kapvortoj ankaŭ menciataj la plej oftaj vortkombinoj.

10.6 *Terminologie orientitaj skizoj*

En tiun ĉi kategorion apartenas mallongaj verkoj, kiuj ankaŭ nomiĝas *artikoloj, eseoj, pristudoj* ktp., havantaj ĉ. dekon da paĝoj. Jam ilia longeco klarigas, ke ili pritraktas nur partajn problemetojn de terminologio. Plej ofte ili aperas en konferencaj prelegkolektoj kaj en fakaj revuoj. Kelkaj revuoj havas specialan terminologian rubrikon, kie estas klarigataj precipe novaj terminoj, kelkaj havas terminologian diskutpaĝon. En nemultaj fakoj ekzistas bibliografioj de terminologiaj skizoj.

10.7 *Aliaj terminologiaj fontoj*

Temas ekzemple pri tradukaj terminologiaj vortaroj kaj alia speciala literaturo. *Tradukaj terminologiaj vortaroj*, dulingvaj aŭ plurlingvaj, estas ege gravaj informfontoj ne nur dum tradukado, sed ankaŭ dum studado de fremdlingva literaturo, dum rapida vortigo de informoj en fremda lingvo, dum preparo por prelego en fremda lingvo ktp. Plej oftaj estas politeknikaj vortaroj, kiujn posedas preskaŭ ĉiu biblioteko.

Registroj de fakaj libroj estas alia aldona fonto de terminologiaj informoj. Ili helpas trovi la deziratan terminon en pli ampleksaj verkoj. Duvortaj aŭ plurvortaj terminoj tie troviĝas en inversa vorta sinsekvo, ekz. *elektra tensio* kiel *tensio, elektra*. En tia sinsekvo ili rajtas aperi ĝuste nur en la registroj, kio havas apartan valoron por sistemigo de la uzataj terminoj.

Bildvortaroj estas alia speciala fonto. Parto el ili enhavas nur bildojn de objektoj kaj iliajn nomojn, kiel ekz. popularaj bildvortaroj de kuracplantoj, kiuj ofte estas eĉ plurlingvaj. Ankaŭ bildoj akompanantaj fakajn verkojn povas esti tia speciala fonto, se ili enhavas nomon de la bildigita objekto. Tiam oni devas agi prudente kaj kontroli la terminojn, ĉu ili ne estas ekz. malprecizaj aŭ eksmodaj kaj ne plu uzeblaj. Ankaŭ terminologiaj normoj ofte enhavas bildojn.

Monografioj povas esti tre fidinda fonto, se temas ekz. pri eldono de disertacioj, kiujn devis prijuĝi fakuloj, kaj/aŭ kiuj aperis en respektata eldonejo. Tiam oni rajtas supozi, ke la aŭtoro uzas terminologion tre zorgeme kaj ĝuste. La samo devas validi pri lernolibroj de unuopaj fakoj, kiuj krome devas taŭgi lingve kaj didaktike.

Krome oni povas trovi deziratan informon en verkoj, kiuj ne havas terminologian temon. En artikoloj kaj en interretaj paĝoj estas utile serĉi *ŝlosilvortojn*. Ankaŭ multaj revuoj postulas de siaj aŭtoroj liston de ŝlosilvortoj, kiuj estas krome parto de biblioteka informadika sistemo kaj ebligas rapidan trovon de la bezonata termino. Bibliotekistoj nomas tiajn listojn „trezoroj". Se kiel ŝlosiaj vortoj estas uzataj laŭnormaj terminoj, estas eĉ iliaj trezoroj fidinda informforto, precipe se ili estas ordigitaj laŭsisteme. Eĉ tie povas plurvortaj terminoj aperi kun inversa vortordo.

Aldona fonto de terminologia informo estas *listoj de simboloj* uzitaj en pli ampleksaj verkoj. En ilia teksta parto oni devus uzi kutimajn, laŭnormajn terminojn. En mallongaj verkoj estas simboloj klarigataj rekte en la teksto aŭ sub koncerna bildo.

Enhavlistoj de fakverkoj ankaŭ povas kompletigi niajn terminologiajn sciojn. Ili enhavas la ĉefajn terminojn, kies enhavo estas pli detale pritraktata en unuopaj ĉapitroj. En didaktike bone prilaboritaj verkoj la aŭtoro en antaŭparolo kaj/aŭ komence de koncernaj ĉapitroj klarigas la plej gravajn uzotajn terminojn, precipe se ili diferenciĝas de la kutima uzo.

11. *Tendencoj en evoluo de terminoj*

Dum evoluo de la fakoj la terminoj modifiĝas, renoviĝas kaj plej ofte kreiĝas novaj. La plej ofta nuna tendenco estas *internaciiĝo*, precipe pro la jam menciita fakto, ke etnolingvoj ne posedas sufiĉe da vortoj. En etnolingvaj terminologiaj sistemoj tial pli kaj pli aperas fremdaj vortoj, afiksoj kaj pseŭdoafiksoj. En komputistiko kaj informadiko venkas anglalingvaj terminoj, ekz. en la slovaka lingvo ekzistas *bit, byte, džojstik, hardcopy, online, offline, procesor* ktp.

Alia ĉefa tendenco estas *kunmetado de terminoj*, aŭ, per aliaj vortoj, pligrandigo de la nombro de plurvortaj terminoj. Kaŭzo de tiu ĉi procezo estas pliprecizigo kaj diferencigo de la enhavo de la koncernaj nocioj. Ekzemple, en la kampo de *permitivo*, komence ekzistis nur terminoj *absoluta* kaj *relativa permitivo*. Kiam oni ekuzis novajn materialojn, necesis diferencigi ekz. *komencan relativan permitivon, maksimuman relativan permitivon* ktp.

La plej malagrabla tendenco estas terminologia malunueco, ankaŭ internaciskale. Ĝi malfaciligas disvastiĝon de imformoj, eĉ kaŭzas informperdojn. Teamoj de fakuloj klopodas forigi la neunuecon per akcepto de diversaj konvencioj kaj, kompreneble, per normigo.

Literaturo

Stoffa, Ján: Terminológia v technickej výchove. Olomouc: Univerzita Palackého 2000.

Kompilis V. Barandovská-Frank

Ricevita 2001-06-10

Adreso de la aŭtoro: Prof. Dr. Ján Stoffa, Ústav UNESCO, Univerzita Konstantina Filozofa, A. Hlinky 1, SK-94974 Nitra

Basic problems of general terminology (summary)

We resume in the present article the first part of monography about terminology, as we need also general remarks about terminological technics, which will be necessary in our terminological work about pedagogical cybernetics. Basic terminological knowledges and notions are discussed, e. g. characteristics of a term and its definition, and general qualities of a term. The main attention is directed to the principles of creation and standartization of terms, and finally the trends in the development of terminology are presented.

grkg / Humankybernetik
Band 42 · Heft 2 (2001)
Akademia Libroservo / IfK

Machbarkeit und Verwerfung.
Kybernetik in der Tradition von Warren S. Mc Culloch und Gotthard Günther

von Bernhard MITTERAUER, Salzburg (A)

aus dem Institut für Forensische Neuropsychiatrie Universität Salzburg

1. *Einleitende Bemerkungen*

Ganz allgemein kann man die Kybernetik als eine interdisziplinäre Systemtheorie beschreiben. Es ist daher möglich, thematische Schwerpunkte zu setzen und auf dieser Basis formale Modelle zu entwickeln. Mein Forschungsansatz ist die Biokybernetik in der Tradition von Mc Culloch und Günther. Dabei spielen Hirnbiologie, Computertechnik, Günther-Logik, Metaphysik und vor allem Psychopathologie eine tragende Rolle.

Als Schüler, "Leibarzt" und Freund des späten Günther hatte ich auch die Möglichkeit über die Bedeutung zu erfahren, welche Mc Culloch nicht nur für die Kybernetik, sondern auch für das philosophische Werk Günthers hatte. Ehe ich mir erlaube über eigene Forschungsergebnisse zu berichten, werde ich zunächst versuchen, den Einfluss Mc Cullochs auf Günther und den daraus entstandenen kybernetischen Ansatz zu charakterisieren.

2. *Die Dialektik zwischen Verkörperung des Machbaren und der Verwerfung des Nicht-Machbaren*

Als Mc Culloch im Jahre 1943 zusammen mit dem Mathematiker W. Pitts die erste Formalisierung eines Neurons veröffentlicht hat, wurde mit dieser Pionierleistung die Kybernetik aus der Taufe gehoben. Mc Culloch ist daher – zumindest nach der Meinung Günthers – der eigentliche Begründer der Kybernetik. Vor allem aber hat Mc Culloch der Kybernetik das wissenschaftliche Prinzip der Machbarkeit nicht nur vorgegeben, sondern auch durch die Entwicklung technischer Systeme demonstriert. Dieses Prinzip lautet: Wenn es gelingt ein System finit und eindeutig zu formalisieren, so können die beschriebenen Funktionen in einem technischen Mechanismus nachgebaut und somit verkörpert werden (Mc Culloch, 1965).

Wenngleich die physiologischen Grundlagen des Neuronenmodells von Mc Culloch mittlerweile großteils überholt sind, hat er dennoch die Methode zeigen können, wie man Hirnfunktionen technisieren kann. So gesehen ist Mc Culloch der "Vater" der heutzutage hoch entwickelten neuronalen Computer.

Als Neurophysiologe hat Mc Culloch jedoch erkannt, dass es im Gehirn ein Zentrum gibt, retikuläre Formation genannt, welches alle spezifischen Gehirnareale integriert, so

dass das Gehirn fähig ist, ein integratives Verhalten zu produzieren. Dieses sich im Hirnstamm befindende Netzwerk ist über Leitungen mit allen Hirnsystemen (Wahrnehmung, Motorik etc.) verbunden. Bei der Formalisierung der retikulären Formation ist Mc Culloch auf das Problem gestoßen, dass es für ein multirelationales System keine passende Logik gibt (Kilmer et al., 1968). Auf der Suche nach einer solchen, ist Mc Culloch auf die transklassische, nicht-Aristotelische Logik von Günther aufmerksam geworden. Mc Culloch war überzeugt, dass Günther über den Schlüssel für die Formalisierung multirelationaler Systeme, wie das Gehirn, verfügt. Er hat Günther daher wissenschaftlich sehr gefördert (Professur am biologischen Computerlaboratorium in Illinois). Der wissenschaftliche Dialog zwischen Mc Culloch und Günther hat schließlich zu einer tiefen Freundschaft geführt.

Wenngleich Günther in seiner Studie "Number and logos" (1995) seine Beziehung zu Mc Culloch eingehend dargestellt hat, möchte ich hier einen Schritt weiter gehen, vor allem was den technischen Ansatz von Mc Culloch betrifft. Das wissenschaftliche Kriterium der technischen Machbarkeit von Mc Culloch ist bei Günther auf einen sehr fruchtbaren Boden gefallen, weil er von Kindesbeinen an von technischen Vorrichtungen (Schier, Segelfliegermodelle etc.) fasziniert war. Durch den Dialog mit Mc Culloch hat sich die "Liebe" Günthers zur Technik wieder aktualisiert, so dass sein Lebensziel die Entwicklung eines "transklassischen Computers" wurde.

Da die mehrwertige, transklassische Logik das Problem der Multirelationalität nicht lösen konnte, hat Günther durch die Orts-Wert-Logik (Kenogrammatik bzw. Morphogrammatik) versucht, eine neue Lösung anzubieten. Die Kenogrammatik gibt allgemeine Regeln vor, wie die Leitungen in einem Computersystem gelegt werden müssen, so dass das System erkennen kann, welche Informationsqualität (Kardinalität) vorhanden ist, wie diese verteilt ist (Distribution) und wo sie sich im System befindet (Position). Formal hat Günther (1971) diese dreifache Systemanalyse Protogrammatik, Deuterogrammatik sowie Tritogrammatik genannt. Ein kenogrammatischer Computer, welcher Günther immer vorgeschwebt ist, konnte jedoch bis heute nicht implementiert werden.

Es ist vielleicht der entscheidende Einfluss von Mc Culloch auf die Günther-Logik, dass Günther einen Rejektions-Operator im Sinne der Verwerfung in die Logik eingeführt hat. Ein Reaktionswert ist so definiert, dass er über eine Wertalternative (z.B. $1 \leftrightarrow 2$) hinausgeht (z.B. 3) und damit diese Wertalternative verwirft. Wesentlich dabei ist, dass es sich nicht um die Negation eines Wertes handelt, sondern dass die gesamte Wertalternative im Sinne eines ontologischen Bereiches (Seinsbereiches, Themenbereiches) verworfen wird. Günther (1962) hat die Rejektion als "Index der Subjektivität" charakterisiert. Hier sehe ich einen von Günther selbst nicht reflektierten Zusammenhang zum wissenschaftlichen Ansatz von Mc Culloch.

Geht man zunächst davon aus, dass ein lebendes System wie der Mensch Intentionen (Wünsche, Bedürfnisse, Sehnsüchte etc.) hat, welche es in einer Umwelt zu realisieren (verwirklichen, verkörpern) strebt. Diesem Streben nach Machbarkeit sind jedoch raum-zeitliche Grenzen gesetzt. So hofft der gläubige Mensch auf ein Paradies, wo sich alle seine Wünsche erfüllen bzw. alles machbar ist. Die Dialektik eines lebenden Systems bewegt sich daher zwischen der Akzeptanz des Machbaren und der Verwerfung

des Nicht-Machbaren, wobei die Zeit eine entscheidende Rolle spielt. Mc Culloch hat die Logik der Verwerfung nicht mehr berücksichtigt. Auch der späte Günther hat dieses lebenserhaltende Prinzip lebender Systeme in späteren Jahren nicht mehr weiter bearbeitet, sondern sich auf die Formalisierung der Vermittlung konzentriert. Kurz vor seinem Tod hoffte er noch, die formalen Grundlagen für eine "Vermittlungsmaschine" ausarbeiten zu können.

Diese Skizze des Einflusses von Mc Culloch auf Günther ist weitgehend meine Interpretation, resultierend aus Gesprächen mit dem späten Günther. Ich möchte nun zu zeigen versuchen, dass die Dialektik zwischen Mc Culloch'scher Machbarkeit und Günther'scher Verwerfung für die Verkörperung lebender Systeme in Gestalt von Robots sowie für das Verständnis psychopathologischer Phänomene weiterführend sein kann.

3. *Einige Prinzipien für "subjektive" Robots*

Die Verkörperung von Funktionen lebender Systeme, insbesondere von biologischen Gehirnen, ist eigentlich "Biomimnese". Will man dabei einen "Hauch von Subjektivität" erreichen, so sind Prinzipien erforderlich, welche im Gehirn verborgen sind und entdeckt werden müssen. Ich habe auf der Grundlage der Dialektik zwischen Machbarkeit und Verwerfung versucht, einige Prinzipien vorzuschlagen, über welche ein Robot verfügen müsste, um nicht nur zu funktionieren, sondern gleichzeitig auch über eine "Individualität" im Sinne der Subjektivität zu verfügen (Mitterauer, 2000).

